

PREZO: 1.- Kr.

Starobrodero  
1948

8971

# MALGRANDA REVUO

Nro 4 • 1948

6a JARO

## ENHAVO:

	Paĝo
Sigelmorkoj kaj mondpaco, de Stellan Engholm .....	1
Lumperiodeco, de Mason Stuttard .....	5
Pri teorio, de L. C. Delj .....	8
Infanaĵoj, de Ernst Lunzer .....	12
Mia lando, de Dorothea MacKellar .....	15
La societo de amikoj de la arbaroj de Richard St. Barbe Baker .....	17
Klavarskribo, de D. v. der Stempel .....	19
Lingvaj sugestoj, de Stellan Engholm .....	22
Literaturo .....	27

*Redaktoro — Eldonanto:*

*STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO*

## MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

### Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.  
Britujo: Libroservo de UEA, Herongate, Rickmansworth (Herts).  
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jörgensgade 4 A, Kopenhago N.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.  
Germanujo: Ing. Hellmut Otto, Bamihlstr. 7, Berlin-Spandau.  
„ Sro Oscar Büemann, Isestr. 79 III, (24) Hamburg 13.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Banco di Roma, filiale, Milano.  
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.  
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.  
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

## MALGRANDA REVUO

Nro 4

6a JARO

1948

### Sigelmalkoj kaj mondpaĉo

De Stellan Engholm

Mi vidis anoncon, en kiu la anoncanto rekomendis al la legantoj aĉeti liajn esperantokorojn (sigelmalkojn) kaj tiel kontribui por savi la homaron de nova milito. Se la anoncanto mem ne esperis krei mondpaĉon per tiu metodo, li tamen sciis, ke troviĝas homoj, kiuj kredas tion farebla. Ne malgranda parto de la esperanta agado estas reklamo por kaj kredo al la potenco de esperantaj koroj de iu aŭ alia speco.

Jam por ekokupi sin pri esperanto — se oni ne faras tion el sole lingva intereso — oni devas havi iom da sopiro al kaj entuziasmo por iu granda celo, nebula aŭ pli malpli klara, por kies atingo esperanto prezentas sin kiel mirakla helpilo. Kiam oni lernas la lingvon kaj konatiĝas kun la pensado kaj revado en esperantaj skribaĵoj, oni ankaŭ fariĝas samidcano, plena de entuziasmo por la mondmissia signifo de la pacokrea lingvo. (Ke homoj fariĝas esperantistoj sole por praktike uzi la lingvon ja povas okazi, sed certe tio estas malofta afero.)

Estas nova formo de la malnova kaj ĉiama homa revo pri perfekta ekzistotato, la revo pri Mesio, la reveno de Kristo kaj la miljara regno, Utopia kaj la perfekta socialista ŝtato kaj miloj da aliaj revoformoj de eta ĝis giganta ampleksoj.

La revo pri la perfekta ekzistotato estas la movoforto de la spirita vivo, de la spirita kulturo en la plej profunda senco de la vorto. Parte ĝi relative facile akordiĝas kun

praktika agado kaj ĝis certa grado realiĝas. Parte, kaj precipe rilate al grandaj "finceloj", estas tre malfacile atingi rezultojn en praktika realigo de la ideoj. La ideoj estu kiom ajn perfektaj, belaj, logikaj — la homoj havas plejparte spiritan konstitucion, kiu tute ne respondas al tiuj ideoj. Ilin influas kaj gvidas al agado tute aliaj aferoj, kaj la plej entuziasma kaj elokventa pledo por pli altaj celoj faras ordinare neniom da impresoj. Kaj se ĝi faras, ĝi plej ofte montriĝas semo falinta sur ŝtonan grundon.

Por la kristanoj de la unua kristana epoko la baldaŭna konkreta reveno de Kristo estis la ĉefa punkto de ilia kredo, la plej grava afero en la tuta ekzisto. Generacioj venis kaj forpasis, sperto malkonfirmis la kredon, tiu malfortiĝis, kaj oni prokrastis la revenon ĝis nekonata estonto. Sed al tiu kredo pri reveno kaj la veno de dia regno estis nedisigeble ligita la plej alta etiko. La kristanoj komencis doni pli da atento al la aktuala vivo, provante organizi ĝin laŭ sia etiko kaj sia mondkoncepto. Tiel pluvivis kaj evoluis la instruo de Kristo, tiel revenas Kristo en la spirita vivo kaj en la agado de la homoj, kaj la sola malhelpo al perfekta dia regno sur la tero estas la kvalitoj de la homoj mem.

La unuaj socialistoj estis sole idealistoj sen multe da praktika kompreno. Ili kreis fantaziajn sociojn kaj laŭ tiaj fantazioj kreis eĉ konkretajn entreprenojn. Ĉio fiaskis. Ĝi ne akordiĝis kun la faktaj kvalitoj de la homoj mem. Sed la revantoj persistis. Paŝeton post paŝeto ili per granda peno praktike atingis parteton post parteto de la granda afero, kiu montriĝis neantingebla per unu paŝo. En kelkaj landoj ili jam tre multe atingis survoje al bona socio, en aliaj malpli. En tiu historio kaj same en la historio de la kristanismo (tio lasta dirita sen iu ajn blasfema senco) certe troviĝas multaj epizodoj same naivaj kiel mondpaco per esperantaj sigelmajkoj.

Mi ne kondamnas la esperantokorojn. Ili apartenas al la homa naturo same kiel apartenas al aliaj homaj naturoj resti neinflueblaj de la entuziasmo por eterna paco. Sed

en la esperanta mondo ni fakte havas iom tro multe da tiaj miraklofaraj sigelmajkoj. (Kompreneble tio estas mia propra subjektiva aserto). Ni havas abundon da simboloj, kiujn ni uzas en ĉiuj penseblaj manieroj, manieroj sublimaj kaj ridindaj. Sed ĉiam, kiam oni tro multe uzas simbolojn, oni facile forgesas, ke ili estas simplaj signoj por multe pli altaj aferoj, kaj ili fariĝas fetiĉoj.

Homoj lernas esperanton, fariĝas samideanoj, portas stelojn, uzas esperantokorojn, elokventas per belaj frazoj pri esperanto kaj paco, kaj ilin plenigas granda entuziasmo kaj firma konvinko: Se ni fidele portos la stelojn kaj uzos la sigelmajkojn kaj ĉiam uzos nian belan lingvon, ni marŝos antaŭen, kaj nia rondo fariĝos pli kaj pli granda, kaj post iom da tempo ni ĉiuj troviĝos en mondo de eterna paco.

Tio estas en si mem kortuŝa bildo de la homo, sed la mirakloatendo havas ankaŭ malavantaĝojn.

En mia junaĝo kelkaj homoj en mia provinco je certa horo atendis la revenon de Kristo. Maljunulo kaj lia edzino en la bela somera nokto iris al iu monteto por fidele akcepti lin. Horo post horo pasis, kaj fine diris la maljunulo: "Ŝajnas ke li malfruas. Iru hejmen, edzino, kaj preparu iom da kafo!"

Ankaŭ la esperantaj atendantoj baldaŭ rimarkas, ke malfruas eterna paco. Unu post alia ili iras hejmen por meti sian kafopoton sur la fornon, kaj post nelonge ŝajnas al ili, ke tiu atendo tamen estis iom naiva afero, kaj la steloj kaj sigelmajkoj kaj la lingvo kaj la afero entute fariĝas iom ridindaj, almenaŭ naivaj. La mondo kaj la homoj ne estas tiel kreitaj, ke la celado de la esperantistoj povas akordiĝi kun la praktika vivo. Kaj ĉar la praktika vivo estas la pli grava, estas pli prudente adapti sin al ĝi ol al la revado de la esperantistoj.

Tuj post la milito esperanto mirinde reviviĝis en multaj landoj, la gazetoj estis vere esperantaj. Sed post iom da tempo esperanto pli kaj pli malaperas el la kolonoj, la ga-

zetoj fariĝas nacilingvaj kaj en nacilingvaj artikoloj oni pledas por esperanto kaj plendas pri malbona ekonomio, manko de intereso, eĉ malprogreso. Dependas de tiuj cirkonstancoj, oni diras. Mi kredas, ke plejparte temas pri homoj, kredantaj al mondpaco per sigelmajkoj, kiuj en sia atendo seniluziĝis kaj reiris al siaj kafopotoj.

Kion fari? Kaj eble pli grave: Kion kredi, se montriĝis malprava la kredo al la pacokrea povo de esperanto?

Esperanto ne povas krei pacon, nek steloj nek sigelmajkoj. Tion komprenas ĉiu homo, kiu povas almenaŭ iomete pensi. Paco kaj aliaj rilatoj inter la homoj dependas de la spirita stato de la homoj mem, de la efektiva spirita stato sed ne de okaze flagranta entuziasmo. Grandajn komunajn celojn oni atingas ne per ia popolmigra marŝado rekte en feliĉoregnon sed per ideofidela vivo kaj devoplenumo de ĉiu unuopa homo en lia propra loko.

Kongruence instruis, ke la stato de la familio dependas de la morala stato de ĝiaj membroj, kaj de ĝi dependas plue la stato de la regiono, de la provinco, de la lando, de la tuta mondo. Tio estas fakto, kiu ne povas ŝanĝiĝi.

Ŝajnas al mi, ke multaj esperantistoj atendas miraklon, okazontan parte mistere, parte pro ilia propra partopreno en la esperanta vivo. Kion fari, kiam la miraklo ne okazas?

Se ni estas konsciaj pri la senco de justo, amo, homeco, ni vivas kaj agas laŭ ili, eĉ kvankam ni eventuale supozas, ke la homaro ne realigos la dian regnon. En mondo de individuoj, la dia regno realiĝos en la individuoj. Individuoj, ne kolektivo, estas la fundamento. Se ni estas anoj de la plej alta kaj bona homa klopodado, ni ne forlasas nian klopodadon pro tio, ke la spirita konstitucio de la plimulto de la homoj ŝajnas nevenkeble kontraŭstara. Justa agado estas la sola inda agmaniero, sendepende de ekstera avantaĝo, sendepende de atingo aŭ neatingo de certaj celoj. Se esperanto estas rimedo por nia vivosenca agado, ĝi restos tia ankaŭ en mondo de eterna malpaco.

La terkulturistoj ne opinias, ke ili per sia laboro kreas paradizon, kie ili poste povos nur ripozi kaj libertempoj. Sed per sia fidela laboro dum tagoj kaj jaroj ili donas nutraĵon al la tuta homaro. La laborantoj sur la kampoj de kulturo kaj homeco same povas kompreni, ke ili ne sukcesos krei paradizon sur la tero, kaj tamen ili daŭrigos.

## Lumperiodeco

De Mason Stuttard

### Nova Scienco pri florado de plantoj

En difinitaj periodoj de la jaro la homoj atendas la floradon de la kreskaĵoj, kiuj ornamas ĉu la ĝardenon, ĉu la sovaĝan kamparon. Oni akceptas la floradon de la asfodelo kaj la galanto en la frua printempo, de la rozo en la somero kaj de la krizantemo (almenaŭ en Eŭropo) en la aŭtuno, kaj verŝajne neniu laiko faras al si demandon, kial estas tiel, aŭ ĉe supozas, ke povus okazi alie.

La botanikisto tamen ne sendemande observas tiun ĉiujare ripetatan fenomenon, sed aktive esploras la kaŭzojn kial krizantemo ne floras, ni diru, en Junio, aŭ primolo malfrue en, ekzemple Aŭgusto. Oni ankoraŭ ne povas doni tute kontentigan respondon al tiaj demandoj, sed observado kaj eksperimentado multe kontribuis al nia scio pri la florado kaj pri la reagoj de plantoj al diversaj stimuloj.

Tial ke en la printempo la temperaturo plialtiĝas kaj la intenso de lumo plifortiĝas, oni eble akceptas tion kiel kaŭzon, kiu determinas la floradon; kaj estas ja vere, ke la florado de iuj plantoj havas fortan kunligon kun ĉi tiu klimata fenomeno. Kiu ajn homo povas kontroli la malfruiĝon de florado sekve de "malfrua" printempo aŭ somero. La fakto tamen restas — konata de ĉiu ĝardenkulturisto — ke kiam oni kreskigas, ekzemple, krizantemojn en vitrodomo je konstanta temperaturo, ĝi ne floras

ĝis aŭtuno, kaj kvankam tia kulturrimedo povas iomete modifi la tempon de florado, ĝi tamen ne estas la baza faktoro kiu determinas la ekburĝonon.

Antaŭ 70 jaroj botanikistoj esploris la problemon, sed sen praktikaj rezultoj; ankaŭ en Usono kaj Germanujo oni faris eksperimentojn, kiuj tamen ne donis multe da rilata informo. Nur 1920 nova malkovro revokis la intereson pri ĉi tiu afero kaj — kiel ofte okazas — la nova stimulo elvolviĝis el esploroj pri tute alia problemo. Du usonaj sciencistoj volis krei hibridon el du specoj de tabako kiuj — maloportune — floris ne samtempe. Oni tial ne povis kaŭzi ekgermon. Post multaj vanaj provoj ili fine konstatis, ke la tempon de ekfloro oni povas ŝanĝi per alligo de la "taglongo" de la planto. Oni konstatis, ekzemple, ke se oni ĉiutage enfermas en malluma skatolo, post ok horoj da kontinua sunlumo, aŭtunfloran planton, ĝi floras en somermezo! Kontraŭe, se oni lasas unuopan elektrolampon prilumi la vitrodomon ĝis la 23a horo ĉiutage, ĝi ne floras en la aŭtuno, sed longe poste! Do la determina faktoro pri florado estas la *lumdaŭro*, sed ne la lumintenso; ĉar rimarku, la lumo, kiun ili uzis, ne estis sufiĉe forta por ebligi legadon! Ĝi tamen povis influi la "taglongon" de la plantoj. Postaj eksperimentoj sugestas, ke ĉe brila lunlumo povas havi efikon.

Post tio multaj esploristoj komencis observadon kaj post nelonge oni povis fari tri malnetajn klasifikojn rilate la floradon: 1) plantoj, kiuj floras ĉe *longa tago*; 2) plantoj, kiuj floras ĉe *mallonga tago* kaj 3) plantoj neinflueblaj per taglongo.

En kategorio 1) troviĝas: rafano, laktuko, spinaco, beto, tritiko, hordeo kaj sojo. En 2) iuj rizoj, primoloj, sojo, iuj fazeoloj, krizantemoj, kaj en 3) tomatoj kaj pipro.

Pri la kategorioj estas necble rigore difini la taglongon. Generale, *mallonga tago* estas 8—9 horoj da lumo kaj *longa tago* estas 14—16 horoj en ĉiu tago el 24. Tiujn periodojn modifas ankoraŭ nova faktoro: la hejmloko de la koncernata planto. Eksemple, tropikaj plantoj kutimas

al taglongo de 12 horoj, kaj iuj ne floras en, ekzemple, angla somero, ĉar la tago estas tro longa. Sovetiaj sciencistoj spertis malfacilon ĉe terpomoj, kiujn ili transportigis el Centra Ameriko. Tiuj ne volonte floris, eĉ nebone kreskis, en Leningrada somero, eĉ en vitrodomo.

Jam en 1927 lumperiodeco (angle: photoperiodism) estis akceptita kiel ĉefa faktoro pri la florado de multaj plantoj, kaj dum la pasintaj dudek jaroj sciencistoj klopodis malkovri la mekanismon per kiu taglongo influas floradon. Oni ankoraŭ ne solvis la problemon, sed faris multajn tre interesajn konstatojn. Ni jam menciis, ke la lumintenso ne gravas, ke nur neforta lumo sufiĉas; sed lumkvalito gravas. Sovetia botanikisto pruvis, ke estas la ruĝa-flava limo de la spektro, sed ne la blua-viola, kiu regas la floradon. Komplikaĵo kreiĝis lastatempe per la konstato, ke tre verŝajne la ĉefa faktoro estas ne simple taglongo, sed *noktolongo*! Usonaj esploristoj observis krizantemojn. Ili komencis per la jam konata fakto, ke ili floras en aŭtuno en 8—10-hora tago. Ili do interrompis la 16—14-horan periodon de mallumo ĉiun noktomezon dum kelkaj minutoj. La rezulto de tiu eksperimento estis, ke eĉ en mallongaj tagoj la krizantemoj ne floris! La kelkminuta lumo meze de la nokto verŝajne neniel influas la taglongon; sed evidente ĝi nuligis la influon de la longa nokto.

Oni ankoraŭ eksperimentas laŭ tiuj indikoj, sed jam nun ĝardenistoj povas malfruigi la floradon de krizantemoj per lumigado de la vitrodomo dum duonhoru meze de la nokto dum aŭgusto kaj septembro. Kiam oni deziras la ekfloron oni ĉesigas la lumigadon. Kurioza fenomeno ĉe lumperiodeco estas, ke en iuj cirkonstancoj se oni traktas ĝermojn dum proksimume 10 sinsekvaj tagoj per konforma taglongo, ili poste floras en kiu ajn taglongo eĉ sen konstanta lumo! La dek tagoj da lumperiodeca enkonduko — tiel oni nomas ĝin — sufiĉas por stimuli la planton formi florburĝonojn, kaj kondiĉe ke la planto daŭre kreskas, la floroj devas malfermiĝi. En Usono kaj Sovetio oni faris ĉi tiujn eksperimentojn kaj malgraŭ tio,

ke ne ĉiuj plantoj respondis al la unua apliko de ĝusta taglongo, restas neniam dubo pri la efiko ĉe tiuj, kiuj estis sentemaj.

La demando nun sin prezentas: kia estas la interligo inter stimulo kaj respondo? La planto ne havas okulojn. Ĝi do ĝi ricevas la stimulon de la longa aŭ mallonga tago? Ĝi havas nenian nervsistemon. Kiel ĝi transdonas la eksteran stimulon al la koncerna loko — nome la loko, kie formiĝas floroj?

Sukceson en tiu esploro havis Ĉajlaĉjan, armena botanikisto laboranta en la Instituto de Planta Fiziologio en Moskvo, kaj Moŝkov, kiu laboras en Leningrad. Iliajn konstatojn oni konfirmis en Usono kaj Aŭstralio.

Ĉajlaĉjan volis konstati, ĉu la folioj ĉu la burĝonoj ricevas la stimulon de taglongo kaj li eksperimentis per krizantemoj. Per sistema "nigrumo" de specifaj partoj de diversaj plantoj (ekz. de folioj, burĝonoj, trunketoj k. s.; samtempe kaj kun variaĵoj) li faris la malkovron, ke la stimulo-reago troviĝas en la folioj kaj estas transdonata al la burĝonoj laŭ la trunketo.

En plantoj ne ekzistas iu ajn sistemo, kiu iel similas al la nervsistemo en la animaloj. Kiel do la stimulo transiras?

Oni jam suspektis, sekve de aliaj eksperimentoj, ke ekzistas en la kreskaĵoj substancoj nomataj, hormonoj, kiuj influas kreskon; kaj la supozo tuj sin trudis, ke eble ekzistas ankaŭ "florhormono" kiu rekte kaŭzas burĝoniĝon. Ĉajliĉjan eĉ kuraĝis nomi tiun hipotezan substanceton "florigeno". Tamen oni memoru, ke kvankam hipotezo estas utila deirpunkto por plua esploro, ĝi tamen ĝis fakta konstato restas nur hipotezo.

Malgraŭ tio, la proprajoj de "florigeno" daŭre sin manifestas. Se oni aplikas al folio — eĉ al nur kvarono de folio — la stimulon de taglongo (fakte la stimulon de nigrumo) kaj poste greftas la folion sur parencan planton, la stimulo efikas ĉe la burĝonado de tiu planto kaj rezultigas konforman floradon, kvankam la planto mem estas virga rilate tian eksperimentadon.

La apliko de nekonforma taglongo produktas en iuj plantoj kuriozajn fenomenojn, krom la florado. Ekzemple terpomoj ne formas tuberojn, salikoj ne povas rezisti froston, kaj iuj arboj ne povas toleri trosekon. Oni povas eĉ malfruigi la velkadon de la folioj en aŭtuno per artefarita plilongigo de la tago. Tio estis rimarkata antaŭ kelkaj jaroj en Genevo, kie arboj sur la stratoj konservis siajn foliojn pro la stratlampoj, kiuj brilis la tutan nokton.

Estas certe, ke la venontaj jaroj donos multe da informo pri ĉi tiu interesege temo kaj, ke esploristoj strebados al izoligo de "florigeno" — kio ajn ĝi estu — kaj poste, se oni sukcesos, la biokemiistoj klopodos sintezi ĝin. Estas verŝajne, ke la tempo iam venos kiam ĝardenistoj povos aĉeti pulvorojn, kiuj determinos la tempon de florado, kaj sekve, de la fruktmaturiĝo.

(Resumo laŭ informo en Science News.)

## Pri teorio

De L. C. Deij

La vortoj teorio kaj praktiko tuj alvokas imagon pri ia kontrasto. Ni vidu en Plena Vortaro la paragrafon pri la unua termino.

Teorio. Spekulativa rezonado aŭ klarigo kontraste kun praktika aplikado. (Kelkaj ekzemploj): ofte tio, kio ŝajnas bona en teorio, ne taŭgas en praktiko; teoria diskutado kondukas al nenio; teorie ĝusta, sed praktike nerealegebla.

Difino kaj ekzemploj estas korektaj; almenaŭ respondaj al la plej ĝenerala koncepto. El certa vidpunkto ili tamen proksimiĝas al la paradokso. Teorio ja estas la esenco de praktiko! Kiu supozus, ke la homo unue verkis kuirlibron kaj nur poste komencis manĝi? Okazis inverse kaj en rilato kun preparado de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kaj

en rilato kun sennombraj aliaj okupoj. En plej fruaj tempoj ekzistis nur la praktiko; la simpla kaj primitiva, mi ŝatus diri la "spontanea" praktiko. Kaj nur post multaj miloj da jaroj la jam rutina homo provis ordigi kaj klasigi la kolektitajn spertojn por instrui junajn kaj senspertajn lernantojn. Komence tio okazis per buŝa komunikado, poste ankaŭ skribe kaj prese en formo de libro. Tiel proksimume naskiĝis la teorio. Ĝi do ne estas spekulativa, sed volas kapti per reguloj la instruon de la praktiko mem kaj ĝin transdoni en facile konsultebla libro.

"La teorio estas ne la semo, sed la floro kaj la frukto de l' praktiko". (Feuchtersleben)

Se plaĉas al vi la aforismo de la granda filozofo, vi ne malkontentos ankaŭ pri mia nova (kontura) difino:

Teorio: Esenco de la praktikaj spertoj kaj konoj de eminentaj fakuloj; pli ofte en formo de sistema lernolibro.

En la cititaj ekzemploj ni anstataŭigu teoria per spekulativa. Spekulativoj baziĝas ne sur spertoj, sed sur observoj kaj impresoj. (Latine: speculari = rigardi ĉirkaŭ si; greklatine theoria = konsiderado, prikonsidero.) La esenca diferenco estas multe pli granda ol la etimologia. La unua povas esti subjektiva; la dua estas (devus esti) objektiva. Spekulativaj rezonoj nur okaze celas praktikan utilon; teorio estas ia kristaligo de praktikaj spertoj.

Povas esti, ke miaj pensoj estas absurdaj el lingvistika vidpunkto. Tute senvaloraj ili tamen ne estas. Tuj homoj rigardas ĉiujn teoriojn spekulativaj en la malbona senco de tiu vorto, do praktike senvaloraj. Aliaj kredas spekulativajn rezonojn teoriaj, t. e. pruvitaj, certaj. Al la unua kategorio apartenas i. a. nekleraj aŭ neinstruitaj tipoj, kiuj pro inerto malŝatas teoriajn studojn. Por akiri faksperton kaj rutinon oni tute ne bezonas (laŭ ili) ekmordi pezajn kaj tedajn librojn. Malprava rezono. Neniom utilas ekz. la rutina lerto skribi kvarcent aŭ kvincent literojn en minuto, se oni konstante pekas kontraŭ la lingvaj reguloj. Kaj ankaŭ el idea, mi preskaŭ dirus el estetika vidpunkto, la teorio (laŭ nia difino) estas tre dezirinda.

Kion vi pensas pri tiuj miloj kaj miloj da laboristoj, kiuj plenumas sian taskon aŭtomate, rutine, ofte nesciante por kio servos la objektoj, kiujn ili mem produktas! Ili estas kvazaŭ bovoj, kiuj tirades la plugilon, sed neniom interesiĝos pri la pensonaska "por kio?"

"La emoj apartigi la teorion de la praktiko estas pruvo pri malklereco." (J. de Colins)

"La teorio kaj la praktiko konstante influas kaj kompletigas unu la alian." (P. Otlet)

Por tiuj homoj el la unua kategorio oni devus propagandi kaj se necese popularigi la teorion. Kaj oni ne timu doni iom pli, ol kiom sufiĉus. Ne estus malutile, se ekz. dompentristo ekhavas pli artogustan distingpovon pri koloroj kaj linioj, aŭ se la simpla ministro povus legi la terepokan, bestan aŭ plantan historiojn, kiujn la naturo skribis ankaŭ por ili sur la nigraj karboj.

Grava malhelpo estas la nesufiĉa distingo inter la konceptoj teoria kaj spekulativa. Mi donu nur unu ekzemplon aktualan almenaŭ por ni Esperantistoj. Ĉu la plena Gramatiko estas la teorio de la lingvo t. e. la esenco de la plej praktika kaj plej korekta lingvouzo, aŭ ĉu ĝi estas kabineta? Similan demandon trudas multegaj fakaj kaj artaj kompendioj. Ni konfesu, ke la popola malestimo kontraŭ teoriaj verkoj ne estas tute senkaŭza. La amuza en tio estas la naiva pretendo de certaj pseŭdotcoriuloj: Sen mia kuirlibro vi tute ne manĝos!

Al la dua kategorio apartenas ankaŭ eminentaj profesoroj. Kiom da homoj konscias, ke ankaŭ la propra politika kaj filozofia vidpunkto pliparte estas ne teoria (provita de la praktiko), sed spekulativa, do en certaj rilatoj nur divena, supoza, hipoteza? Ĉi tie mi ne volas tro emfazi. Kvudaj paroloj ne havas konvinkoforton kaj do estas senutilaj. Eble ni povos interkonsenti pri tio, ke ĉiuj niaj revoj kaj idealoj pri la bela mondo de morgaŭ estas nur hipotezaj almenaŭ rilate la teknikan efektivegeblon (kaj afekciaj rilate la idean valoron!) Ekzistas do nenia motivo pretendi, ke sole ni estas pravaj. Oni ne konkludu el miaj vortoj, ke mi malaprobas spekulativajn rezonojn.

Tute ne! Mi volas simple esprimi la deziron, ke la prudenta homo nete rekonu ilian proponecan karakteron. Mi volas havi tiajn teoriojn, kiujn oni povas kun fido proprigi al si. Ni deziras ankaŭ spekulativajn teoriojn (kompreneble kun bona elekto de trafaj argumentoj), sed ĉi tie ni metas la postulon de kritika esploro. Tio estus grava progreso. Ni tamen ne kredas, ke iom pli preciza difino de iu vorto alportos utilon. Temas ne pri vortoj, sed pri konceptoj kaj ideoj.

## Infanaĵoj

De Ernst Lunzer

"Infanaĵoj, ĉu?" diris la fama maljuna profesoro, skuinte la blankan kapon. "Ne estu tro memfidaj pri via superco. Ne estas esenca diferenco inter infana psiko kaj plenkreskula. Miajn plej valorajn spertojn pri la homa animo mi kolektis dum mia junaĝo, kiam mi estis licea instruisto. Tiampe la klasestro akompanis siajn lernantojn tra la tuta etapo de la unua ĝis la lasta klaso; la dekjara knabeto evoluis sub lia gvido ĝis dekokjara junulo. Tiel, kompreneble, mi funde konatiĝis kun miaj disĉiploj kaj povis studi ĉies bonajn kaj malbonajn ecojn. Kaj mi ripetas, ke mi observis ĉe la infanoj la samajn kvalitojn kaj difektojn, burĝone kompreneble, kiuj apartenas al la homa gento ĝenerale.

Unu generacio de lernantoj restas en mia memoro pro gravaj malfacilaĵoj; ne pro manko de intelekto — ili estis ne pli ne malpli inteligentaj ol la kutima mezo — sed pro la fakto, ke mi ne sukcesis disciplini tiujn diablojn. Eble kulpis ŝanĝoj de la socia strukturo de nia urbo, ĉiukaze la klaso estis pli miksitaj ol kutime, kaj la religiaj, rasaj kaj sociaj baraktoj de tiu epoko reĉiis en la lernejkorto, eĉ en la klasĉambro. Senfinaj plendoj kaj kvereloj, harŝiradoj kaj akuzoj, inter partioj kaj individuoj, la

vivo fariĝis neĉtenebla. Preskaŭ ĉiutage mi devis interveni aŭ intervenigi la aŭtoritaton de la lernejestro. Tiu ĉagrena stato daŭris plurajn jarojn, kaj mi jam rezignis pri mia eduka influo. Ĉio ĉi ja ne estas tre interesa kaj ne valorus detalan rakonton krom pro la fakto, ke subite la sinteno de la klaso kaj ĝia moralo profunde ŝanĝiĝis.

Mi ne tuj konsciĝis pri tio, nur iom post iom mi rimarkis, ke la spirito de la tuta klaso pliboniĝas. Ĉesis la bataloj, kaj mi ne bezonis plu interveni por pacigi aŭ juĝi kverelojn; la interrilatoj inter la malamikaj partioj fariĝis korektaj, preskaŭ koraj. Mi tre scivolis pri la vera kaŭzo de tia profunda ŝanĝo sed preferis, ke la knaboj sin aranĝu sen mia enmiksiĝo. Tamen mi sukcesis post nelonge trapenetri la misteron, kaj la solvo min surprizis eĉ pli ol la mistero mem; ĉar mi ekhavis neatenditan envidon en la animon de unu el miaj junuloj.

Longtempe kaj diskrete esploriginte mi eltrovis, ke la nova teniĝo de mia klaso dankiĝis al la influo de Eŭgeno G. Tio min konfuzis, ĉar ĝis tiam mi ne estis trovinta elstarajn kvalitojn ĉe tiu knabo; laŭ mia opinio li estis tro fermita kaj sinretirema. Mi serĉis okazon alproksimiĝi al li, kaj aranĝis vesperajn kamparpromenojn kun li, kaj baldaŭ mi sukcesis ricevi liajn konfidencojn. Por dekkvarjarulo liaj opinioj estis mirige maturaj.

"Unue", li konfesis, "mi estis same kverelema kaj batalema kiel miaj kunuloj, mi same malamis la kontraŭulojn kaj plezure malutilis aŭ kontraŭbatalis ilin. Sed kiam mi komencis ĝui legadon, mi unue tre ŝatis aventurajn historiojn de la "Sovaĝa Okcidento Amerika". Nun ni ja malcstimas tiun falsan romantikon, sed tiam min impresis la grandanimeco kaj trankvila indeco de la grandaj indianĉefoj; mi klopodis ilin simili. Kiam malfermiĝis antaŭ ni granda klasika literaturo, mi instinkte entuziasmiĝis pri grandanimaj herooj. Ĉu vi memoras la poemon "La Garantio", kiun ni lernis kun vi antaŭ du jaroj? Kie la sangosoifa tirano estas venkata de la grandanimeco de sia viktimo? De tiam mi ekpensis, ke en nia klaso ni estas sur maljusta vojo. Dividitaj je du partioj,



ĉiu konsideris la aliajn kiel malindajn, nehomajn. Diskrete mi provis konvinki miajn kolegojn, ofte vane. Sed grava ŝanĝo okazis lastajare.

Mi estas filatelisto kaj ankaŭ Marteno D., kiu sidas malantaŭ mi, pasie kolektas poŝtmarkojn. Vi ja scias, Marteno estas la ĉefgvidanto de la alia partio. Estas malpermesite, mi scias, ludi dum la lecionoj, sed mi devas konfesi, ke tiam mi trarigardis sub la pupitro grandan koverton plenan de interesaj poŝtmarkoj. De malantaŭe Marteno observis min kaj flustris, ke li deziras interŝanĝi kun mi la poŝtmarkojn, kiuj mankas en lia kolekto; ĉu mi konsentus prunti al li malgrandan nombron, ĝis li alportos siajn duoblaĵojn? Senhezite mi alprenis la rolon de unu el miaj grandanimuloj kaj pasigis al Marteno la koverton dirante, ke li forprenu sian bezonaĵon kaj poste alportu siajn duoblaĵojn.

Marteno mutiĝis pro surprizo. Tia traktado ne estis kutima inter ni. Ĝis tiam ni estis por ili nur putraj hundoj kaj skabiaj ŝakaloj, kaj ni nomis ilin malodoraj ŝtelistoj. Ke mi konfidas al Marteno tute sen kontrolo altvaloran koverton, tio ja estis miriga. Poste li konfesis al mi, ke tiam lia tuta koncepto pri homaj rilatoj renversigis. Kaj de nun li ambiciis montri sin inda je mia konfido. Tiam estiĝis nia amikeco. De tiam ni ofte vizitis unu la alian, kaj decidis uzi nian influon sur la kolegoj por plibonigi la rilatojn inter la du partioj. Kaj vi, sinjoro profesoro, ja rimarkis, kiel bone ni sukcesis.

Tio estas la historio de Eŭgeno kaj Marteno kaj iliaj du partioj", finis la blankhara profesoro; kaj post paŭzo: "Banalaĵo, vi diras, infanaĵo? Povas esti. Mi ne scias, ĉu Eŭgeno plenkreskis, aŭ ĉu li mortis dum la militoj, verŝajne li mortis, estas ja tio la sorto de grandanimeco. Sed mi pensas, ke kelkaj el niaj unuaj ŝtatgvidantoj povus tiri tre utilan lecionon el tia infanaĵo."

## Mia lando

De Dorothea MacKellar

La amo al la arbarcto, kampo,  
La ombra paŝvoĵeto muskvelura,  
La bonordita bosko kaj ĝardeno,  
En vi ja estas sento purnatura.  
La amo al la foro grizeblua,  
La bruna riveret', ĉiel' malhela,  
Ĝin konas mi, sed ne ĝin simpatias ...  
Al bel' alia restas mi fidela.

Mi amas landon, kie suno brulas,  
Kun stepoj de vastego grandetenda,  
Kun montoĉenoj de majesto kruda,  
Jen seka tempo, jen pluvad' torenta.  
Mi amas ĝiajn forajn horizontojn,  
La maron ĝian, kiu geme flamas,  
Belecon ĝian — ankaŭ timigecon —  
Ho vasta, bruna lando, vin mi amas!

La ringhakitaj arboj morte-staraj  
Fantome blankaj sub la nokta luno,  
La montoj en nebuloj el safiro,  
La tagomeza pac' sub ora suno.  
La verda kreskmiksaĵo en ĝangalo,  
La serpentado de lian-implikoj ...  
Orkidoj tie rampas ĝis arbsuproj,  
Kaj teron ruĝan ombras la filikoj.

Ho lando mia, centro de la koro!  
Ĉielo blua sen pluvad-promeso,  
Ni vidas ĉirkaŭ ni, animpremate,  
La brutojn morti pro la pluvneceso.  
Sed poste grizaj nuboj kunariĝas,  
Kaj preĝe dankas ni pro ŝanĝo sorta,  
Ĉar jam al la orcloj batsonore  
Atingas sono de pluvado forta.

Ho lando mia, centro de la koro!  
La lando de la ĉielarka oro ...  
Sekecon, fajron, tempon de malsato,  
Kompensas vi trioble per trezoro.  
Sur teroj sekbakitaj, pluvsoifaj,  
Al kio ni rigardis maltrankvile,  
Jam nun vidiĝas vualeca verdo;  
Densiĝas herbetaĵ' tapiâsimile.

Ho lando kun la koro el opalo,  
Petolkaprica lando malavara,  
Por homo, kiu vin neniam amis,  
Konfeso mia restos ja malklara.  
La mondo tenas milojn da belaĵoj,  
Sed kie ajn min trafos spiro lasta,  
De tie flugos fine, karmemore,  
La pensoj al la bruna lando vasta.

Tradukis *F. R. Banham, Melbourne.*

#### Notoj:

Strofo 3: ringhakitaj. En Aŭstralio, por mortigi arbon, oni hakile tranĉas ringon ĉirke en la ŝelon, por malebligi al la suko ĝin nutri.

Strofo 4: ruĝa tero. La teraĵo sur kiu kutime kreskas en Aŭstralio la "bracken fern" (gen. *Pteris*, precipe la *P. aquilina*, komuna en preskaŭ ĉiu lando) estas ofte, se ne ordinare, ruĝa, supozinde pro sia ĥemia konsisto, fera enhavo.

Strofo 5: La dua linio eble ne estas klara por ĉiuj. Aliaj landoj ankaŭ havas "oron ĉielarkan"; povas esti, ke la aŭtorino aludis al la Biblia promeso simbolita per la ĉielarko en Genezo. Cetere ekzistas legendo pri la pelvo kun oro; longa laborado kompensita per abunda trezoro. Ankaŭ eble nerekta aludo al la famaj orserĉaj vojaĝoj en Aŭstralio historio, 1854 kaj sekve.

Strofo 6: Opal-hearted. Simbole al la malmola (senindulga) koro de la lando? Aŭ pro tio, ke Aŭstralio estas unu el la tre malmultaj landoj, en kiuj opaloj troviĝas relative riĉe. Vidu *La Rondo*, aprilo 1948.

*F. R. Banham.*

## La societo de amikoj de la arbaroj

*De Richard St. Barbe Baker*

Sendube kelkaj el la paroladoj de "Onklo Vanja" en la teatraĵo de Antono Ĉeĥov faris impreson al tiuj, kiuj antaŭ nelonge aŭskultis la prezentadon. Permesu, ke por tiuj, kiuj ne havis tiun bonŝancon, mi citu: "Dro Astrov vartas la grandaĝajn arbarojn kaj replantas arbojn ĉiujare. Li diras, ke la arboj estas la ornamo de nia tero, ke ili instruas la homojn, por ke ili komprenu la belon kaj agordu sian senton al altaj sferoj. La arbaroj mildigas rigoran klimaton, kaj en regionoj, kie la klimato estas pli milda, oni ne perdas tiom da forto per batalo kontraŭ la naturelementoj, kaj tie la homoj estas afablaj kaj ĝentilaj. La loĝantoj de tiaj regionoj estas malavaraj, obeemaj, sentemaj, graciaj en ago kaj parolo. Ilia filozofio estas optimisma, arto kaj scienco floradas ĉe ili, kaj ili traktas delikate la virinojn." Astrov ne kontraŭstaras la arbohakadon pro neceso; sed li demandas: "Kial detruu la arbarojn? La arbaroj de Rusujo tremadas sub la batoj de la hakilo. Milionoj da arboj pereis. La hejmoj de sovaĝaj bestoj kaj birdoj estas detruitaj; la riveroj malŝvelas, kaj belegaj pejzaĝoj malaperis por ĉiam".

Tiun staton oni povas konstati en preskaŭ ĉiu lando de la mondo, kaj la rezulto de ĝi estas, ke la dezertoj grandiĝas kaj la bazo de la vivo malaperadas. Dum la pasintaj jarcentoj la "pioniro" kun la hakilo ĝuis la admiron de siaj samtempuloj. La plugilo sekvis liajn paŝojn, kaj grandaj terpecoj estis ekspluatataj por produktado de nutraĵoj, per kiuj oni nutris bestojn mortigotajn por la homa nutrado. Oni taksas, ke 90 % de la kulturebla tero estas uzata tiel, kaj pro tio nin nun minacas malsatego. La virgaj arbaroj ne plu povas sufiĉi al la bezonoj de la homo, kaj se ni volas haltigi katastrofon tutmondan, estas necese kontraŭagi tian evoluon. La homo devas trovi pacon kun la naturo kaj kunlabori kun ĝi, se li volas plu ekzisti sur nia planedo.

La uzo de artefaritaj fekundigiloj kaj grundstimuloj plirapidigis la elĉerpigon de la grundo. Nudigita per forigo de la arboj, bruldifektita, elĉerpita per troa herb-kreskigado, senigita de humo pro ĉiama rikoltado sen replenigo, la arbaro estas viktimo de la neevitebla katastrofo, kaj novaj saharoj (dezertoj) formiĝas. Dum la sekaj sezonoj tiu surfaco de la grundo fariĝas polvo kaj perdiĝas en la ventoj. Sen protekto de arbaroj kaj ŝirman-taj arboj tiuj ventoj fortiĝas kaj dezertigas la nudajn teritoriojn. Kiam fine pluvos, tio ne helpas, ĉar la polvo ne povas absorbi la pluvon, kaj la restaĵoj de la grundo, kun siaj valoraj saloj, estas forlavataj laŭ la tersulkoj en la inundantajn riverojn. Ekzemple: oni taksas, ke en Ameriko, de kiam tiu kontinento estis koloniigata, teritorio granda kiom la kulturita spaco de Germanujo perdis sian fekundan grundon. Eminentaj kompetentuloj en Usono admonis siajn samlandanojn, kaj fama usona inĝeniero diris, ke per la nuna malŝparo de la grundo, tiu ĉefbazo de ĉia individua kaj kolektiva vivado, Usono estos limigata al malpli ol cent pluaj jaroj da fortika nacia ekzistado. Tiaj solenaj admonoj estas ripetitaj de aliaj aŭtoritatuloj, kiuj antentigis pri la fakto, ke unu okono de fekunda tero en Usono estas detruita per erozio, plua okono estas jam preskaŭ detruita, kaj sur plua kvarono la erozio jam estas aganta. Tiuj samaj aŭtoritatuloj profetis, ke post cento de jaroj Usono ne estos plu kapabla nutri unu homon.

Dum pli ol kvarona jarcento la Societo de la Amikoj de la Arboj (The Men of the Trees, The Gate, Abbotsbury, Anglujo) laboradis, por disvastigi universalan komprenon pri la arboj kaj por planti, protekti kaj ami la arbojn ĉie. Ĝiaj anoj konsideras la arboplantadon kiel mezurilon de vera civitaneco, kiel antaŭzorgeman agon por estonteco eĉ ne tre malproksima. La fideluloj de la societo komprenas, ke la arboj estas la ĉefa gvida forto en la reciproke efikantaj energioj de atmosfero kaj geosfero (tersurfaco), kaj ke de tiu interludo inter la fortoj dependas fekundeco kaj vivo. Ili admiras la arbojn pro

ilia belegeco kaj pro la inspiro, kiun ili donas al la vivo, kaj samtempe ili ne malatentas la materiajn benojn havigatajn de la arbaroj. La societo sukcesis vivigi komprenon pri la arboj en multaj partoj de la mondo, kaj ĝi nun kunlaboras kun reprezentantoj en kvardekkvar landoj por krei Tutmondan Ĉarton por Arbarkulturado, kiu mildigos la timindan evoluon al dezertiĝo en la mondo, kies nutraĵfontoj jam nun fariĝas nesufiĉaj.

La ĝenerala tendenco estas, ke oni lasas problemojn de tia vasteco al la koncernaj registaroj. Efektive, la tasko estas tiom granda, ke ĝi necesigas la konkordan kunlaboron inter ĉiuj landoj. Tamen, ankaŭ ĉiu individuo havas grandan taskon. Entreprenemaj individuoj komprenos, ke rehavigi arbojn kaj arbarojn sur la tuta terglobo estas la baza kondiĉo de novaj esperoj. La Societo de la Amikoj de la Arboj diras bonvenon al ĉiuj personoj bonvolaj, kiuj jesas sian ŝuldon al la posteuloj kaj la dependecon de la homaro de la vivanta arbo, kaj kiuj estas pretaj helpi al la evoluo de sana, prospera kaj feliĉa mondo.

La aŭtoro, ano de la Londona Vegetara Societo, publikigis tiun ĉi artikolon en ĝia organo The Vegetarian News, en la somero 1948. Tradukis Oscar Büncmann. 8.7.1948.

## Klavarskribo

De D. v. der Stempel

Nia ordinara skribmaniero por muziko estas tiom komplika, ke eĉ eminentaj komponistoj kaj muzikologoj esprimis la deziron, ke ĝi estu anstataŭata per io pli simpla kaj pli logika. Kelkaj specialistoj eltrovis aliajn sistemojn, sed ĝis nun kelkjarcenta tradicio malhelpis ilian adopton.

Klavarskribo estas tia nova sistemo, facila kaj laŭnatura. Pri ĝi mi tamen havas nenium praktikan sperton, nek per persona nek per instrua uzo. Mi do donas ĉi tie nur kelkajn impresojn, ricevatajn per atenta lego de la esperanta resumo.

Nia ĝisnuna sistemo skribas la muzikon; ni legas ĝin kaj poste devas trovi sur la instrumento la sonojn, kiujn ni legis.

Klavarskribo (kiel la bone elektita nomo diras) estas ne "muzikskribo". Ĝi estas "instrumentskribo". Anstataŭ legi sonojn, oni rekte legas la manumadon de la instrumento.

Multaj el ni konas la facilan metodon por ludi citron: oni ŝovas paperfolion sub la kordojn, kaj la diversaj nigraj punktoj sur ĝi montras al la ludanto, kiujn kordojn li devas tiri por ludi la muzikaĵon, por kiu la folio estas destinita.

Klavarskribo estas simila metodo por klavarinstrumentoj (ĝi ekzistas ŝajne ankaŭ por aliaj instrumentoj). Oni legas ĝin vertikale (de supre al malsupre). Sur la paperfolio oni imitas reduktitan klavaron (ekzemple de piano). Sinsekve du kaj tri nigraj linioj reprezentas la nigrajn klavojn, kaj la blankaj interspacoj reprezentas la blankajn klavojn. Nigraj punktoj sur la nigraj linioj kaj cirkletoj (aspektantaj kiel blankaj punktoj) sur la blankaj interspacoj indikas al la ludanto, kiujn klavojn li devas tuŝi por ludi difinitan pecon. Mezuro kaj taktoj estas indikitaj per ciferoj ambaŭflanke de la linearo: 1,2 por dutakta, 1,2,3 por tritakta mezuro ktp. Tiamaniere oni evitas ĉiajn teoriajn kaj skribajn komplikajojn kiel ekz. kromsignojn, klefojn, kromliniojn, tonalojn ktp.

La metodo ŝajnas al mi lerte konceptita, kaj ĝi meritas konsideron, speciale de la instruaj medioj. Same kiel la Berlitzmetodo por instrui lingvojn, ĝi antaŭ ĉio lernigas la praktikon. Poste la lernanto povos dedukte studi la teorion.

Por esti perfekta muzikisto ja ne sufiĉas simple ludi instrumenton laŭ indikoj sur papero. Oni devos akiri ankaŭ teoriajn konojn, ekz. la ideon pri tonaleco, pri parenceco inter tonaloj, pri plen- kaj duontonoj ktp, kiujn oni ja povas studi aparte, sed kiujn en nia ordinara "muzikskriba" sistemo estas jam figuritaj. La praktikaj malfacilaĵoj de tiu lasta sistemo havas do teoriajn meritojn. Sed ĝi havas ankaŭ praktikajn kvalitojn: la "muzika" skribo estas sama por ĉiuj instrumentoj, tiamaniere ke iu ajn instrumentisto povas legi la parton de iu ajn alia instrumentisto. Orkestrogvidanto havas antaŭ si partituron, kie resume, sur la sama paĝo, estas figurataj la diversaj partoj de la komponaĵo. Kiamaniere realigi tion per "instrumenta"

skribado, kiu nepre estas diferenca por ĉiu instrumentkategorio\* (instrumentkategorioj tiusencaj estas: klavarinstrumentoj, frotataj kordinstrumentoj, tirataj kordinstrumentoj, kupraj blovinstrumentoj ktp.) Se klavarskribo estus ĝenerale adoptita (mi kredas, ke ĝi jam ekzistas por aliaj instrumentoj sen klavaroj), tiam orkestrogvidanto devus koni la specialan skribmanieron por ĉiu instrumento ne apartenanta al la sama kategorio. Ĉar presformo kaj legado estas vertikalaj, la partituro devus enteni ĉiun apartan skribmanieron, unu flanke de la alia. Tia partituro estus volumena kaj nepre pli komplika, pli malfacile supervidebla.

Sed sur aliaj kampoj la nova metodo povas fari bonajn servojn. Kiuj spertaj pianistoj ne sentis la malfacilon de kromlinioj en ĉiuspeca muziko? Kaj kiuj el ili ne spertis gravan malhelpon pro komplikaj plurnotaj akordoj en la moderna muziko? En tiu lasta la tonaleco ne estas tute rigora, kaj en la disonancaj akordoj abundas surmetitaj kromlinioj, kiuj tute malhelpas normalan, rapidan legadon.

Tiaj kontraŭaĵoj tute malaperas, se la skribmaniero rekte montras la ludotajn klavojn, kvankam ĝi ne donas bildon de la harmoniaj valoroj. Nia malnova notskribo ne bone adaptiĝis al la lastatempa revolucio en la muziko. Cetere muzikludado estas ja ne nur arto! Ĝi estas ankaŭ valora distro aŭ tempopasigo. Ekzistas tiom da personoj, kiuj ŝatas muzikon kaj sincere deziras studi ĝin. Ne celante la tutgrandan artistecon, ili volas simple akiri bonan konon de iu instrumento por povi ludi ĝin. Sed ilin timigas la grandaj malfacilaĵoj, kiujn ili devas majstri. Kiam ili komencas lerni, ilia malrapida progreso kaj la granda tempoperdo senkuraĝigas ilin. La malfacila notskribo certe ludas gravan rolon en tio!

Por tiaj personoj kaj iliaj instruantoj klavarskribo povas esti bona rimedo. Ili sendube multe pli facile kaj rapide venos al bona rezulto.

Se la ĉefa celo de klavarskribo estas popularigi muzikon kaj meti ĝin al la dispozo de ĉiuj, ĝi vere respondas al tiu celo, kaj oni tiukaze povas nur aplaŭdi ĝian eltrovon.

\*) ankaŭ: "instrumentoj de la sama familio".

Estus dezirinde, ke ĉiuj muzikistoj almenaŭ sciigu pri ĝia ekzisto kaj ĝia atingobleco.

La eldonejo aperigis ankaŭ katalogon pri komponaĵoj jam aperintaj en klavarskribo. Inter ili estas verkoj de la plej famaj komponistoj, de la moderna same kiel de la romantika kaj klasika periodoj.

Konciza kompendio, katalogo, riceveblaj de  
Klavar, Slikker, Nederlando.

## Lingvaj sugestoj

De S. Enholm

### Kelkaj rimarkigoj pri "Skizoj el Nederlando"

La aŭtoro diras ie, ke lia unua impresio de Nederlando estis "la brikoj. Kaj fenestroj. Kaj precipe bicikloj. Kaj precipe brikoj kaj fenestroj." — Aliloke pri tio, kio plej plaĉis al li: "la loĝejoj. Kaj la bovinoj. Kaj la havenoj. Kaj Vermeer van Delft. Kaj la floroj. Kaj la grafitoj. Kaj la firmamento."

Homoj, kiuj tiel skribas, verŝajne rigardas tion spritaĵo. Bedaŭrinde ankaŭ multaj legantoj tion faras kaj ankaŭ imitas. Sed ĉu havas sencon esprimi sin kiel ne parolkapabla infano, kiam oni kapablas formi bone konstruitajn frazojn? Se oni en libro, kia estas liu ĉi, konsideras tiun esprimmanieron defendebla, la spritaĵo tamen restas spritaĵo de tre primitiva speco.

Pri la bicikloj: "... tio estas apenaŭ bicikloj, sed kolektiva tuto, svarmoj, amasoj, aroj da bicikloj." — Sensenca amasigo de vortoj, el kiuj la tri lastaj neniom fortigas la impreson de la unua — sed nur malfortigas la impreson. La unua esprimo ŝajnas al mi eĉ la plej forta, do devus formi la finon, la kulminon de la serio.

La supraĵ rimarkigoj ne rilatas al la traduko. Jen pri ĝi. Sur p. 7: "mi referencas vin al Flinck..." Mi antaŭe ne vidis "referenci" kun akuzativo, eble nur pri tio la esprimo ŝajnas

al mi iomete neordinara. Ĉu bone aŭ ne mi ne kuraĝas tuj diri, nur metas demandosignon.

P. 9: "John Galsworthy, pli blanka ol antaŭe ... tre rektstatura kaj nekonfideciema." Laŭ Pl. V. konfidenco estas sciigo, kiun oni konfidigas al iu, kaj kiun tiu ne devas malsekretigi. La portreto de Galsworthy estas nur ĝenerala. Ŝajnas al mi, ke oni nur en specialaj okazoj atentigas pri homoj, ke ili ne emas fari konfidencojn. La originalo eble diras, ke G. ne emas intimiĝi kun aliaj, sed tion mi ne scias.

P. 11: "ŝalom Asch, la ĵargona poeto..." La esprimo ne diras, en kiu lingvo verkis Ŝ.A. Lingvo, kiu fariĝis literatura, apenaŭ meritas la epiteton ĵargono.

P. 17: (pri ciklisto) "... li flugas antaŭen, ne bezonante tro poni, nek farante per tio plej malmulte da bruo." Se li ne faras plej malmulte da bruo, li logike devas fari pli multe da bruo. Mi supozas, ke la senco estas: "nek ... iom ajn da bruo."

P. 21: Nederlandaj urboj troviĝas apud akvo. La aŭtoro diras, ke la homoj konstruis samtempe du urbojn, "unu sur la bordo kaj duan speguliĝantan en la akvo." La senco tie ĉi estas klara. Mi faras nur ĝeneralan lingvan atentigon. "Duan speguliĝantan (urbon)" en alia interrilato povus esti crariga — la duan urbon, kiu ankaŭ speguliĝas same kiel la unua. Komo sufiĉas por forigi la neklarecon.

P. 36: "... faris tion ... kvazaŭ kiel oni segas tabulon." La esprimo estas korekta sed ne plaĉas al mi. Mi preferas: "... same kiel".

P. 84: "ĉie ajn". Tiu esprimo ne havas sencon. Ĉie estas ĉie, kaj iu kroma, ajna loko ne povas ekzisti. Devas esti "kie ajn" aŭ "ie ajn".

P. 87: "Travojaĝante Nederlandon, la turisto konscias (preserarc koncias), kiom la naciaj karaktero kaj ordo speguligigas en la eteco de ĝiaj mezuroj." Multaj tro multe uzas ek-, sed tie mi ŝatus ekkonscias.

### Pri "Diablot en la Botel"

P. 9: "Keave... rigardadis la domojn ambaŭflankajn kun plezuro." La tradukinto uzas multajn ne necesajn -ad. "Kun

plezuro" pli bone staras post la verbo. Mi preferus: "... rigardis kun plezuro la domojn sur ambaŭ flankoj."

P. 15: "ordonu, kaj kiam okazis, kion vi deziras, mi aĉetos la botelon ...". Tiel uzi imperfekton anstataŭ futuran preteriton estas pensebla kaj farebla sed certe ne rekomendinda. Tia evoluo verŝajne havus nebonajn sekvojn. Pli bone uzi la pli longajn sed ĉiam klarsencajn formojn. Do: "... kiam estos okazinta".

P. 20: "kelkiu". Sensenca kunmeto. Oni povas diri nur "iu". "Kelka" en singularo povas montri nur al kvanto.

P. 21: "kaj la nova domo lia tiel plaĉe vidiĝis ...". Certe oni povas esprimi sin tiel en esperanto, se troviĝas kontentiga motivo. En tiu ĉi kunteksto ni ne trovas motivon. Eble la esprimo de la originalo diferencas de la ordinara, sed tio ne pravigas esperantan formon, kiu aspektas sole afekta.

P. 25: "ĉiu ajn" — vidu supre "ĉie ajn".

P. 25: "en eko". Mi povas kompreni tiun substantivon nur kiel substantivigon de -ek. Al mi ĝi impresas kiel vortluda anstataŭaĵo de subite.

P. 25: "eksaltis ekriante". La dua ek- certe ne bezonata.

P. 27: "mi maldiru lian nomon". Kial ne diri: "mi ne diru lian nomon, mi silentu pri lia nomo"?

P. 34: "Ili opiniis plej prudenta (mi prof. prudente) lupreni ('lui' sufiĉus) domon ... paradegonte per mono kaj pomonte per ĉaroj kaj ĉevaloj". La senco de la lasta parto estas ne klara. Se tia estas la senco, estus pli bone diri: "... por paradi ... kaj pompi ...".

P. 35: "ektimo ŝin kaptis". ek- superflua.

P. 37: "la ombroj ŝajnis al ŝi kaptantaj brakoj de malbonaj iuj." Ĉu ne iom naiva esprimmaniero?

P. 39: "Keave manĝis la pladojn puraj." — Malplenaj.

P. 39: "pli detalaj moneroj" — pli malgrandaĵoj, pli malaltvaloraĵoj.

P. 40: "morgaŭc de ŝia ofero". Pli klara kaj simpla ŝajnas al mi: "la tagon post ŝia ofero".

P. 40: "li sentis sin ĝenata tial ke li amuziĝis, dum lia cdz-

ino malgajis". Ĉio okazas samtempe. Sekve: "sentis sin ĝenata, ke li amuziĝas ... malgajas."

Mi ne esploris detale la du librojn, nur notis esprimojn, kiuj kaptis mian atenton. Mi notis ne por malica kritiko, nur por eventuala instrua utilo aŭ por diskutado.

\*

Finna samideano letere demandis min, kion li devas pensi pri la ortografia propono. Mi intencis nenion skribi pri tiu propono. Sed eble ekzistas aliaj same maltrankvilaj? Do:

Kiu vortbildo estas plej simpla kaj klara — ŝargho aŭ ŝarĝo? Mi ĉiam trovis, en diversaj lingvoj, ke unu litero por unu sono estas pli avantaĝa kaj pli agrabla ol pluraj literoj por unu sono. Jam Johano Hus (mortinta 1415) kreis por la ĉeĥa alfabeto ŝ, ĉ ktp. — kun la eta diferenco de esperanto, ke la ĉeĥaj literoj havas kojnojn, la esperantaj tegmentoĵojn. La ĉeĥoj ĝis nun ne plendis pri la invento de Hus. La lingvosciencistoj uzas la samajn supersignitajn literojn kaj multege da aliaj. Tion ili trovas racia kaj prudenta. La supersignitajn literojn, kiuj troviĝas en diversaj lingvoj, ili nomas pliriciĝo de la origina latina alfabeto.

La problemon pri maŝinkompostado per supersignitaj literoj — ekzistas tiaj en multaj lingvoj — tre bone klarigis H. Schoonenberg (fakulo pri maŝinkompostado), Amsterdam, en artikolo en Ukraina Esperantisto. La artikolo estas represita en "Esperanto" de sept. 1948. Tiu problemo entute ne ekzistas.

Sed nur kelkaj presejoj en la mondo havas la specialajn esperantajn matricojn, oni ne povas presigi esperante en kiu ajn presejo. Tiel oni diras, kaj tio estas vero. Nu, kion vi farus, se ĉiuj presejoj en la mondo havigus al si kontentigan stokon da esperantaj matricoj? Ĉu vi povus doni al ili kontentige da laboro?

Aliflanke: Ili ne havas esperantajn matricojn nun, sed se vi post pli malpli longa tempo mendos ĉe ili konsiderindan kvanton da esperantaj presaĵoj, ili havigos esperantajn matricojn — same kiel ili havigus rusajn, arabajn, sanskritajn, se nur venus kontentigaj mendoj.

Ni ne krcos novajn esperantistojn per malsimpligita ortografio, nek krcos per tio esperantan literaturon kaj esperantan gazeton. Pli da energio kaj persisto estas bezonata por tio, ol kiom postulas ŝanĝo de la esperanta ortografio.

La sama finna samideano plendis, ke en libroj ekzistas eraroj kaj nebonaj esprimmanieroj. Antaŭ la presado kompetentaj homoj devus tiel zorge kontroli kaj korekti la manuskriptojn, ke la libroj fariĝus senripoĉaj el lingva vidpunkto, precipe la libroj por komencantoj.

La plendo estas prava. Stilaj mankoj kaj iufoje eraroj troviĝas en la pli multaj esperantaj libroj, ĝenerale ne ofte, sed tie kaj tie oni povas trovi ilin.

Rilate al la pledo: Corte ĉiuj aperantaj libroj (almenaŭ se eldonataj de eldonejoj) estas kontrolitaj kaj pli malpli korektitaj de iu komitato aŭ de privata kontrolanto. Sed kiel en tiu okazo povas resti nebonaj stilaĵoj kaj eĉ eraroj?

Kontrolado kaj korektado de manuskriptoj plej ofte estas tre tuda afero. Tial ne estas strange, se la atento ne sufiĉas por ĉiu detalo. Mi trovas, ke en mezgranda kaj ĝenerale bonstila libro kelkaj eraroj kaj nebonaj esprimoj estas pardonoblaj.

Generala plibonigo de la esperanta stilo rilate al klarco kaj simpleco estas dezirinda afero. — Tiu aserto certe ne estas tro subjektiva. Al tio kontrolantoj povas nur iomete kontribui. Ilia tasko ne estas reverki la tekston. Tia ĝenerala plibonigo estas atingebla tiel, ke ĉiu esperantisto, de komencantoj kaj ordinara lingvouzantoj ĝis tradukantoj kaj verkantoj, pli severe kaj konscie kontrolas sian propran uzon de la lingvo. Nur tiel kaj per la postuloj de la legantoj kaj la ambicio de tradukantoj kaj verkantoj ni atingos la dezirindan lingvokvaliton.

## Literaturo

Karel Čapek: Skizoj pri Nederlando.  
Tradukis G. J. Degenkamp.  
Eldonis Libroservo FLE.  
Prezo 1,75 fl.

La libro estas tipografie tre plaĉa. Ĝi estas nek luksa nek artafekta, sed ĉio estas bonguste aranĝita kaj faras la legadon facila kaj agrabla. Tiurilate ĝi povas servi kiel modelo — ne tiel, ke oni imitu ĝiajn detalojn, sed imitinda estas la maniero aranĝi libron praktike kaj bonguste. Se la esperantaj libroj ordinare estus tiaj, la legemo eble estus iom pli granda.

La aŭtoro vizitis PENkongreson en Nederlando kaj samtempe rigardis la landon, la popolon, la kulturon. La skizoj unue eble aperis en gazeto. Ĉiokaze ili estas verkitaj en la maniero de artikolo sur la distra paĝo — "babilo" (causerie), sed lerte kaj inteligente farita babilo. Lian babilon akompanas multege da descgoj, faritaj de li mem. Ili estas tre simplaj sed samtempe tre lertaj kaj trafaj, bonhumoraj kaj instruaj.

La babilo komenciĝas simple kaj ŝerce, kaj ĝi ne apartenas al la plej altaj ŝtupoj de literaturo. Sed sur sia ŝtupo ĝi estas perfekta. La fantazioj de la aŭtoro prezentas faktojn pri Nederlando kvazaŭ per infanfantazia pensoludo, ĉiam sprita. La prezentado estas tre imagokrea. Leginte la libron oni detale memoras preskaŭ ĉion en ĝi kaj akiris solidan fundamentan scion pri la temo.

La babilo estas komence facila kaj ŝajne supraĵa, foje vere supraĵa, sed iom post iom ĝi sereniĝas, serioziĝas, profundigas, kaj en la lasta parto de la libro, kiu temas pri nederlanda kulturo, ĝi fariĝas altvalora literaturo. Malantaŭ la eksteraĵo de la amuza rakontisto kaj instruisto aperas filozofo kaj humanisto, kaj la amuzaj skizoj pri Nederlando finiĝas kiel gravaj pensoj kun universala signifo.

Mi ne scias, ĉu ĉiuj vidpunktoj kaj asertoj en la libro (t. e. la serioza senco de la pensoludaj frazoj) ĉiam estas ĝustaj aŭ verŝajne ĝustaj. Se eventuale troviĝas io diskutinda, ĝi esence

neniel malpliigas la valoron de la libro — ĝi estu juĝata laŭ sia speco.

Aĉetu la libron, legu ĝin mem kaj metu ĝin en la manojn de komencantoj! Tio lasta akcelos ilian lernemon.

La stilo de la traduko ŝajnas esti la kutima stilo de Degenkamp. Ĝi ne estas molflua kaj eleganta aŭ sprite saltanta, sed ĝi havas la kvalitojn de konscia kaj konseienca laboro pri niaj esprimrimedoj. Jen kaj jen li kreas tre trafajn vortojn kaj trafte uzas aliajn. Mi trovas ĉe li ankaŭ vortojn kaj esprimojn, kiuj, laŭ mi, estas diskutindaj aŭ eĉ craraj. Sed pro kelkaj mankoj (kaj tio rilatas al ĉiuj verkantoj) ni ne forgesu la bonan kaj valoran.

Tio ĉi mi mencias tri vortojn, kiuj ricevis sian formon verŝajne pro pretervido. Anstataŭ inercio kaj klacisismo mi preferus inerto kaj klasikismo, kiuj jam troviĝas en PL.V. Lctonio certe estas la sama lando, kiun ni iam nomis Latvio aŭ Latvujo. Ĝi iel malaperis kaj el la esperanta mondo kaj el la aktuala konscio de la cetera mondo.

Mi faros la eksperimenton trakti aliajn lingvaj rimarkigojn pri la libro sub "Lingvaj sugestoj" en tiu ĉi numero.

\*

Robert Louis Stevenson: Diablot' en la Botel'.  
Tradukis Jozefo Seka.  
Esperanto-Verlag, Mozartstr. 6, Mainz, Germanujo.  
Prezo nemontrita.

Mi vidis la titolon kaj pensis: Jen nova sensenca kaj fuŝa traduko. Rilate al la titolo mia impreso restas. La originalon mi ne legis kaj momente ne povas eĉ ekscii ĝian titolon. Kia ajn ĝi estas — la esperanta titolo tamen devus esti senafekte esperanta. La apostrofado ŝajnas sensenca. Devus esti Diabloteto en botelo aŭ La diableto en la botelo.

Sed la interno de la libreto agrable forviŝis la unuan impreson. Stevenson havas unuarangan rakontostilon kaj li lerte aranĝas sian materialon. Tiu rakonto estas verŝajne tiom malmulte konata ekster Britujo kaj ĝi estas literature tiom valora (kiel rakontarto), ke la elekto estas pravigebla kaj eĉ laŭdinda.

La antaŭparolo komenciĝas per germane peza frazo, sed la

traduko neniel suferas de tiu kvalito. Ĝi havas diversajn vortojn kaj esprimmanierojn, kiujn mi ne ŝatas (mi traktos ilin sub Lingvaj sugestoj), sed ĝi havas ankaŭ alian kvaliton, kiu igas la leganton preskaŭ forgesi la mankojn: ĝi havas tre fluantan stilon kaj laŭ mia kompreno tre vivoplenan.

Papero kaj kovrilo atestas, ke la rimedoj en Germanujo ne respondas al la kapablo de la homoj. La tipografio estas bona kaj meritis pli bonan paperon. Tamen ĝi verŝajne estas tre bona laŭ germanaj cirkonstancoj.

Aĉetu kaj legu la libron! Ĝi meritas tion, kaj la germanaj esperantistoj meritas tion. Per aĉeto de ili vi ebligas al ili aĉeti de via lando.

\*

Hans Wagner: Ni devas diri ĝin.  
Kultur-Aufbau-Verlag, Stuttgart-Botnang, Germanujo.  
Prezo ne montrita.

Tiu libro estas leginda kaj pripensinda, kvankam malgrandaj literoj kaj grandaj paĝoj faras la legadon ne agrabla. Ĝi konsistas el diversaj artikoloj, leteroj, paroloj, sed la enhavo tamen estas unueca. Temas pri la kaŭzoj de la hitlera reĝimo, estas defendo por tiuj germanoj, kiuj estis kontraŭ Hitler, estas pledo por pli bona kaj prudenta agado de la okupantoj.

Pledoj kaj pledoj kaj la prezento de la germana afero ŝajnas al mi pravaj. Pli bonigo de faritaj eraroj bedaŭrinde nun ŝajnas tre malfacila. Maturiĝas jam la fruktoj de disigaj intereso kaj reciproka suspekto de la grandpotencoj kaj de malprudenta planado pri Germanujo.

Ni ne estu naciistoj, sed homoj! — tiel finiĝas la enkonduko de la libro. Bone — sed en kelkaj lokoj oni, laŭ mia kompreno, akceptas la malnovan malbonon en nova formo kaj sub nova nomo. "For la mensogon, ke la proletaro iulanda kunkulpas pri teruraĵoj de ties kapitalista registaro!" — "Gekdoj, la kapitalistoj ĉie en la mondo bezonas la naciismon, tiun danĝeran bacilon, por disigi la laborantan klason kaj maski la rabadon." — Tiuj asertoj venas el la koncepto, ke unu parto de la homoj estas malbona, kulpas pri ĉio malbona kaj estas malprava en ĉio, sed alia parto estas tute senkulpa kaj pravas en ĉio. Mi



bone scias, ke profiteco kaj monopotenco povas fari grandan malhonon al multaj homoj, kaj la valoron kaj la belajn rezultojn de laborista batalo kontraŭ profiteco kaj monopotenco oni eble vidas ĉe ni en Svedujo pli bone ol en iu alia lando. Tamen profiteco, potencemo, krueleco troviĝas plimalpli ĉe la homoj sendepende de klasoj, landoj, rasoj. La koncepto, ke tiuj malbonoj troviĝas nur unuflanke sed tute mankas aliflanke estas la plej granda danĝero, kiun la laborista klaso renkontis sur sia vojo al pli bonaj kondiĉoj. Tia koncepto malhelpas ĉe la homoj memstaran pensadon laŭ sperto, faktoj kaj logiko, ili fariĝas robotaj ripetantoj de donitaj devizoj kaj agitvortoj. Tiel ili preparos grundon por nova profiteco, potencemo, krueleco, kreskintaj el ilia propra medio. Povus veni la tago, kiam ili devus diri: "Kamaradoj, la regantoj bezonas la socialismon por disigi la homojn kaj maski la rabadon." Tiam oni komprenus la vortojn de Kant, kiuj estas cititaj ie en la lasta parto de la libro — se la justo pereus, tiam ne plu havus sencon, ke homoj vivus sur la tero.

\*

Sinopse Estatística do Brasil (1946).  
Eld.: Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística,  
Rio de Janeiro, Brazilo.

Impona statistika libro pri Brazilo, eldonita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Lingvoj: portugala, angla, esperanto. Tia libro povas esti pli bona pledo por nia lingvo ol centmilo da flugfolioj. Sajne ĝi informas pri ĉio, kion vi en statistika libro povas scrĉi pri Brazilo, pri ĝia materia stato kaj ĝia spirita vivo. Esperantistoj, kiuj povas efektive utiligi tian scion, nepre havigu la libron.

## STATO DE MR

Pro la alvoko en la pasinta nro oni mendis 200 ekz. de nroj aperintaj antaŭ 1947 (por po 0,50 kr.). Roterdama samideano ricevis 70 ekz., proponis ilin al siaj samklubanoj, kaj ĉiuj estis senpene vendataj en unu vespero. Ĉu oni povus fari simile en aliaj kluboj kaj aliaj urboj? De nun mi vendos ĉiujn nrojn aperintajn antaŭ 1948 por po 0,50 kr. (neta prezo).

La nombro de rektaj abonantoj estas nun (okt. 1948) 249, ekz. distribuataj de revendantoj 135, sume 384. El tiuj sufiĉe granda nombro iras al landoj, el kiuj pago estas necerta. Meza enspezo por unu ekz. estas ĉ. 0,75 kr. Preskvanto estas 600 ekz., kio estis sed pro altigitaj kostoj ne plu estas la minimuma nombro, por ke la enspezoj kovru la elspezojn. Post ekspedo de ekz. al gazetoj, verkintoj ktp. restas do preskaŭ 200 ekz. La nuna kosto por unu nro — preso, honorarioj ktp. — estas minimume 450 kr. —

Iuj samideanoj multe kaj fidele helpis per mendoj, revendo, abonigo, sed certe troviĝas ankoraŭ iuj, kiuj volas ion fari por la plua ekzisto de MR. Per mendo de malnovaj nroj kaj havigo de novaj abonoj, ankaŭ por 1948, vi farus valoran servon al la afero.

*S. Engholm.*

## Komento

De tempo al tempo oni esprimas bedaŭron, ke iu verkisto, fama pro sia verkado en nacia lingvo kaj ankaŭ aprobanta esperanton, ne verkas foje ion en esperanto. Tio estus ja multe pli praktika propagando ol la nura rekomendo, kies utilo en la praktika vivo estas tre malgranda.

Dezirante tion oni tamen iom miskomprenas la demandon. Nome la literaturaj virtuloj de la naciaj lingvoj estas homoj, kiuj jam elektis sian lingvon, sian medion de sinesprimado. Ili estas majstroj sur unu instrumento; kaj deziri, ke ili ludu alian instrumenton, estas same naive kiel admoni gloran violoniston, ke li ludu pianon. Certe tio povas okazi; sed ni komprenu bone, ke tia okazo estus escepto kaj ne natura fenomeno. Kaj se okazas, ke nacilingva aŭtoro skribas en esperanto, ni ne atendu, ke li verku same bone kiel en sia nacia lingvo. Ĉar, kiel diris Ludoviko Tárkony, la verkisto ĝenerale ne povas atingi la plej altan punkton en du lingvoj, sed li devas elekti

por si sian lingvon de kreado: lingvon, laŭ kies ritmoj kaj rime-  
doj li pensados kaj sin esprimados.

Sekvas do kurioza dilemo: ke la plej bonaj esperantaj verkistoj estas ĝuste tiuj, kiuj elektis esperanton kiel unikan rimedon de esprimado: kiuj do ne havas altan reputacion en la nacia lingvo. Sekve ilia gloro estas interna, ĉe ni. Eĉ malpli, ĉar nur malgranda parto de la esperantistaro konas ilin.

Kion do fari? Mi opinias: du aferojn. Unue ni devas kulturiĝi la esperantistaron, por ke niaj artaj verkistoj havu la kontentiĝon kaj stimulado de ŝatanta publiko. Due ni devas nin turni al la tasko traduki la plej bonajn esperantoverkojn — pocziajn kaj prozajn — en la naciajn lingvojn. Mi opinias, ke jam venis matura tempo por tion kuraĝe entrepreni, ĉar niaj literaturaj riĉoj ja valoras tion. Kaj tiam ekatentos pri ni la ekstera kultura mondo.

*R. Rosetti.*

**RIMARKIGO.** La supra artikolo estas radia parolo, kiun sro Rosetti faris en Malmö 7. 8. 1948. Li sendis la manuskripton al MR. La temo almenaŭ parte rilatas al kelkaj punktoj en mia parolado en Literatura Vespere. Se iuj eventuale supozis, ke mi volas diri, ke grandaj nacilingvaj verkistoj verku ankaŭ en esperanto, ili miskomprenis min. Per miaj ekzemploj mi volis nur montri tion, ke la cv. intereso por esperanto ĉe gravaj kulturpersonoj ofte restas nur pasiva, due ke kulturpersonoj de alta nivelo estas grava afero por nia movado. La konkludo estis, ke ni mem devas klopodi por atingi tian nivelon, kiu povos havi signifon por la cetera mondo.

Mi plene konsentas kun sro Rosetti, ke arte verkanta aŭtoro povas uzi nur unu lingvon kiel esprimrimedon, almenaŭ se temas pri esencaj esprimaspiroj. Sed mi tute diferencas de lia opinio, ke la tempo estas matura por traduki esperantajn verkojn en naciajn lingvojn. Ni ankoraŭ ne havas literaturon, pri kiu atentus nacilingvaj literaturamantoj. Ke esperantistoj atentus pri esperanta literaturo kaj eĉ tre laŭdas ĝin ne nepre signifas, ke ĝi havas konsiderindan valoron. Tia literaturo restas ankoraŭ kreota. Kaj se nia kulturlaboro iam atingos tian nivelon, ke iuj esperantaj verkoj estos kompareblaj kun la efektive altvaloraj verkoj de konsiderinde gravaj naciaj lingvoj — tiam tradukoj en naciajn lingvojn verŝajne ne estos bezonataj.

*S. Engholm.*